

Neglektita kultura heredaĵo de Hector Hodler

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 februaro 26 kaj 28

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo87-07/SRI-1987-07-A-3-1987-02-26-28-Claude-kaj-Andree-GACOND-Neglektita-kultura-heredajho-de-Hector-Hodler.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND, daŭrigante sian prezenton de la penso de Hector Hodler, la fondinto de UEA.

Originala karakterizaĵo de la ĵurnalista verko de Hector Hodler konsistas el tio, ke la plimulto el liaj artikoloj ne parolas pri Esperanto. Ili raportas pri "nuntempaĵoj", do fakte pri politikaĵoj, laŭ supernacia humanismo. Tiuj tekstoj disvolviĝas laŭ logiko kaj objektiva kritikemo, kiuj ŝokas kaj allogas. Ilia aŭtoro estis tutcerte ne nur kuraĝa, sed samtempe talenta ĵurnalisto. Kaj sian talenton li dediĉis je la servo de la paco, konsciante, ke li plenumas edukan rolon. Tiurilate la plej karakterizaj jaroj estas tiuj de la - unua mondmilito.

A.- Dum tiu ĉi periodo aperis interalie en la revuo "Esperanto" vico de dek-ok artikoloj dediĉitaj al "la pacproblemo" kaj titolitaj **Novaj Vojoj**, kiuj formas perlon de la originala esperanto-literaturo. Ni esperas, ke tiuj ĉi tekstoj, kunseeble la aliaj artikoloj dediĉitaj en esperanto kaj en la franca al la pacaj kaj militaj problemoj, foje aperos libroforme. Povu niaj radioprelegoj altiri la atenton de kelkaj aŭdantoj al tiu kultura heredaĵo neglektita.

Cl.- Hector Hodler ne nur influis la esperantistojn pere de siaj frontartikoloj en la revuo "Esperanto". Pere de siaj analizoj, kiuj malfermis la gazeton "La Voix de l'Humanité", li tutcerte influis la konstruintojn de Ligo de Nacioj. Fakte la organo "La Voix de l'Humanité" (la voĉo de l' homaro), kiu en 1914 esprimis la vidpunktojn de la organizaĵo "La Ligue pour l'organisation du Progrès" (la ligo por la organizo de la progreso), fariĝis ekde 1917 la organo de "le Comité pour la Préparation de la Société des Nations et de la Ligue pour la Défense de l'Humanité" (Komitato por la preparo de la Ligo de Nacioj kaj de la Ligo por la defendo de la homaro).

A.- Okaze de la morto de Hector Hodler, oni legis en la numero 137 de "La Voix de l'Humanité", ni traduke citas:

Cl.- Niaj legantoj... memoras pri la artikoloj tiel logike striktaj kaj malavare inspiraj, kiujn Hector Hodler sendadis al ni dum pluraj jaroj. Preskaŭ ĉiu numero de la gazeto entenis unu el liaj studoj pri la tag-okazaĵoj; liaj ideoj larĝanimaj kaj humanecaj perfekte akordiĝis kun la agad-programo, kiun ni fiksas al ni.

A.- Konklude al tiu nekrologia artikolo, estas menciita la influo de Hector Hodler favore al la konstruo de la Ligo de Nacioj. Ni citas:

Cl.- "La kaŭzo de la homara rekonstruo tra la Ligo de Nacioj estis senigita de unu el siaj plej valoraj forĝistoj.

A.- La artikoloj de Hector Hodler pri la pacproblemo estas la rezulto de tre vasta studo, pri kiu raportas Edouard Stettler en sia antaŭparolo al la libro "Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko". Ni citas tiun ĉi atestaĵon; kiun oni trovas je la paĝo 48-a:

Cl.- Dum 1915 mi vidis lin diktantan sciencan tezon. Leviĝis la vualo, kiam en 1916 li sendis al ekzameno maŝinskriban verkaĵon je 378 paĝoj, prespretan, sed sen titolo. Estas forte dokumentita kaj pripensita franclingva traktaĵo pri paca organizo de la popoloj. Ĝiaj kvar partoj nomiĝas: La problemoj; la solvoj de la pacifistoj; la solvoj de la federalistoj; la metodo.

A.- Kaj Edouard Stettler aldonas:

Cl.- En la komenco li deklaras, ke tiu verko ne rilatas al la milito, ĉar kiel ajn ĝi finos, kiaj estis la personaj respondecoj de diversaj ŝtatestroj, "la ĉefa kulpulo estas la internacia anarĥia malordo de kiu la milito estas neapartigebla. Kiel malmoralaj, kiel senigataj je konscienco estis certaj politikistoj, ili ne estus povintaj malutili, se la civilizita mondo estus organizita favore de la paco anstataŭ por la milito,"

A.- Ni ne scias, ĉu tiu ĉi manuskripto de Hector Hodler troviĝas en arkivejo de biblioteko, kun la aliaj manuskriptoj de la fondinto de UEA, aŭ ĉu la tuta manuskripta verkaro de tiu homo pereis,, Edouard Stettler tiel atestas pri la ekzisto de tiuj dokumentoj:

Cl.- Havinte la malgajan taskon travidi la multajn manuskriptojn de la kara mortinto, mi trovis plurajn eldonojn de tiu verko, kies perfektigo lin multe okupis,, Bedaŭrinde ĝi aperis dum malfavora epoko. Francio, meze en la milito, havis taskojn pli urĝajn, kaj la franc-svisaj eldonistoj tro dependis de la franca legantaro por riski la elspezojn de la presado. Ankaŭ la nomo de Hodler estis tro malmulte konata ĉe la granda publiko. Ŝatis lin multe kelkaj internaciaj societoj, al kiuj li liveris okaze artikolojn, sed sian vivon li estis plene dediĉinta al Esperanto, kie ne amasiĝas laŭroj...

A.- Konklude Edouard Stettler aldonas:

Cl.- En tiu bela verko la legantoj de "Esperanto" rekonu la fonton de multaj rimarkindaj artikoloj... La ĉefa parto, kiun ni rajtas konsideri kiel la spiritan testamenton de Hodler, meritis esti bele presata en la lingvo paciga, de li amegata.

A.- La dek-ok artikoloj dediĉitaj al "la pacproblemo", kiujn ni menciis komence de tiu ĉi prelego kiel perlon de la originala esperanto-literaturo aperadis en la revuo "Esperanto" de julio 1915 ĝis februaro 1917, do dum unu jaro kaj duono. Hector Hodler daŭre atentigis la legantojn, ke tiuj artikoloj estas la sinsekvaj ĉapitroj de vasta studo.

Cl.- Por doni ideon pri la temoj pritraktitaj, mi legos enhav-resumon, kiun publikigis Hector Hodler mem.

1-a Parto. La pacproblemo ne estas morala aŭ ekonomia, sed politika kaj jura. - La pacifistaj proponoj. La arbitracio kiel ĝi estas ĝis nun proponita ne estas sufiĉa, ĉar mankas al ĝi bazo de internacia pozitiva juro kaj la necesaj trudrimedoj. - La principo de la popolrajto je memekzisto devas esti la jura bazo de la estonta ordo. Ĝia apliko postulas interŝtatan organizon. - La limigo de la armadoj. La armadoj estas neevitebla necesajo pro la neorganizita stato de la nacioj. Malfacileco trovi akcepteblan limig-formulon. Limigo de la armadoj estos nur konsekvenco de interŝtata organizo.- Reformo de la diplomatio. La procedoj de la diplomatio estas kondiĉataj de la internacia ŝtatsistemo. Nur la starigo de ŝtatligo havus la nepran efikon transformi la diplomation, ĉar la funkcio mem de la diplomataro ŝanĝus kune kun la internacia reĝimo. - La komerca politiko dependas de la politika reĝimo. La

protekcionismo estas la natura produkto de la interŝtata anarkio kaj povos malaperi nur kun ĝi. - La rolo de la/gazetaro.

2-a Parto: Fundamentoj de la federacio (ŝtatligo). Kongreso el la reprezentantoj de la ŝtatoj; ĝia organizo. Plenuma povo. Internacia polico, - Ekzameno de la ĉefaj kritikoj kontraŭ la federacio. - La metodoj: Necese de popola propagando kaj reedukado de la publika opinio. Mankoj de la ĝisnuna paco movado. Plano de nova organizo de la paco movado.

A.- Dum la venontaj elsendoj ni citos fragmentojn el la artikoloj de Hector Hodler.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*